

Año IV (N.º 48)

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 12

DICIEMBRE
1 9 5 2
RUZAFA, 7
VALENCIA
(E S P A Ñ A)

BONAN KRISTNASKON! 1953!
MULTE DA PROSPERO EN LA NOVA JARO

Un año más, en este mes de Diciembre, en pleno ambiente navideño, celebramos los esperantistas el aniversario del nacimiento del Dr. Zamenhof, presentando a la admiración pública la figura del ilustre sabio que, modesta y generosamente, sin mundanas vanidades ni torpes afanes de lucro, hizo a los hombres el maravilloso regalo de un segundo idioma, como lazo de unión, para todo el mundo.

ANEKDOTO

Antaŭ ne multe, la famkonata hispana verkisto Jacinto Benavente prezentis al la madrida publiko sian lastan komedion.

Malgraŭ la bonaj kvalitoj de la verko, ĝi ne multe plaĉis, kaj la dua prezentado fariĝis antaŭ malmulte da ĉeestantoj.

Fervora admiranto kaj amiko de Benavente renkontis lin, post tiu dua prezentado. Gratulante la aŭtoron li emfazis pri la granda plezuro, kiun li trovis en la dirita teatraĵo. Benavente, kun sia sprita kaj delikata ironio, respondis trankvile:

—Ho, jen demando solvita! Tiu estas vi, la sola, kiu havis kuraĝon ĉeesti...

INTER KURACISTOJ, EN HOSPITALO

—La malsanulo numero 304 eltenis tre bone la operacion. Li nek moviĝis.

—Ĉu la numero 304? Okazis eraro! Al tiu oni devus esti farinta la nekropsion!...

LA PILKO

Originala verseto tute sen apostrofoj nek supersignitaj literoj.

Infano posedis pilketon,
La pilkon hundino forprenis;
li iris hundinon kun peto,
la besto nenion komprenis.
—Se pilkon vi volas, pupeto,
panpecon vi portu kurante.
Li iris patrinon, kaj peton
li faris treege plorante.
—Se panon vi volas, fileto,
pri lakto mi longe sopiras.
Li kuris bovinon kun peto:
—Bovino, mi lakton deziras!
—Se lakton vi volas, bubeto,
la herbon tre longe mi atendas.
Li venis herbejon kun peto:
—Herbejo, mi herbon pretendas!
—Se herbon vi volas, knabeto,
la akvon mi longe ne vidas.
Li vadis riveron kun peto:
—Rivero, mi akvon avidas!
—Se akvon vi volas, vireto,
aeron mi jam ne enspiras.
Li flugis aeron kun peto:
—Aero, mi venton aspiras!
Kaj blovis facila aero...
Li blovon rapide ekprenis;
akceptis la venton rivero,
kaj akvo subite alvenis.
Herbejo la akvon atingis,
li herbon senhalte alprenis,
bovino malsaton estingis;
li lakton senpepe elprenis,
kaj panjo la lakton ricevis.
Li panon rapide kunprenis,
kaj tion, pri kio li revis,
la knabo finfine reprenis...
Pilketon posedis infano.
La pilkon hundino forprenis;
li iris hundinon kun pano,
la besto facile komprenis!

RICARDIN QUILES (Valencio)

Se oni lernis, oni povas instrui!
GOETHE.

SFINKSA ANGULETO

ENIGMAJ KARTETOJ

ŜIRMILO		RENTO
K TU		EoZ

Oni akceptos solvojn, por la premio, ĝis 15. Januaro

SOLVO DE LA MATEMATIKA EKZERCO EN LA PASINTA NUMERO

La kvanto estas: **123** aŭ **246**

◆ GUTETOJ DE GAJA HUMORO ◆

—Jen granda sekreto por konservi la sanon: Manĝi krudajn bulbojn!

—Tre interese; sed rimarku, ke tio estas tre malfacila por konservi la sekreton.

—Tiu statuo de virino estas perfekta.
—Al ĝi nur mankas paroli.
—Tial mi diras, ke ĝi estas perfekta.

LA AĜO DE LA ARBOJ

La arboj kaj la plantoj ankaŭ estas submetitaj, kiel la ceteraj vivantaj specoj, al la naturaj leĝoj de naskiĝo kaj morto. Rilate la daŭron de vivo en la arboj, kompetenta botanikisto asertas, ke 700 jaroj estas la maksimuma aĝo de pino; la abio povas vivi 425; la fago, 245; la poplo, 210; la betulo, 200; la frakseno, 170; la saliko, 145 kaj la ulmo, 130. Plej mirinda estas la olivarbo, kiu povas vivi milojn da jaroj.


Laŭ aserto de scienculo, kvankam la dekstra mano estas pli sperta por palpi, la maldekstra spertas pli akute la efikojn kaj influojn de varmo aŭ malvarmo.

En Afriko ekzistas griloj tiel grandaj, ke ili povas tute facile kapti musojn.

Laŭ observaj faritaj de naturistoj, la abelo ne estas tiel laborema, kiel oni kredas; ĝi laboras nur tri horojn potage.

Oni devas lasi vivon al la vivo
VIENA PROVERBO.

KRISTNASKO: LA SANKTA VESPERO EN BERLINO



Jen mallonga raporto pri la Kristnoktofesto aŭ Sankta Vespero ĉe ni en Berlino; mi aŭdis, kiel petole oni festas ĝin en Usono, kiel serioze en Britio, kiel bonguste en Jugoslavio k. t. p. Tamen, ĉu ne ankaŭ mondkonata la kutimo de la germanoj al ĉi tiu granda festo?

Nu; jam en la semajnoj antaŭaj, ĉiu sekrete gardas siajn intencojn. Oni pensas kaj pensas, kiamaniere oni aĉetos per sia malmulta mono belajn donacojn por la gefamilianoj kaj geamikoj. Tiam estas la plej bonŝanca tempo por butikoj kaj vendejoj; belegaj objektoj logas nin en la montrofenestroj. Vidante tion, la infanetoj skribas longajn sopirajn leterojn al la *Kristnoktoviro* aŭ al la Jesuoinfano; en tiuj leteroj ili mencias siajn dezirojn, kredante, ke anĝeloj kaj etuloj, en la ĉiela laborejo tuj komencos labori por komplezi iliajn dezirojn.

La plenkreskuloj ankaŭ atendas neĝon aŭ blankan nokton; ĉar tiel la Sankta Vespero estos pli intima kaj hejmeca. Vere, la festo komenciĝas jam en la 24ª. Mi rakontos, kiel okazis ĉe mi pasintan jaron la solenaĵo: Mia patrino estis tre okupata preparante la vespermanĝon. Mia plej aĝa frato zorgis pri la kristnaskarbo, belege kreskinta abio, alta je du metroj, kiun li ornamis per arĝentaj globetoj, kandeloj kaj rubandoj el stanpapero. Tiun laboron li faras ĉiujare; mi kovris la skribotablon per la plej bona tuko, sur kiun ni starigis la abion, kaj sub ĝi la dometon de Bethlehem, kiun ankaŭ tre bele miaj fratoj konstruis antaŭ kelke da jaroj. Ho, kiel multe ĝojigas min, ĉiun jaron denove, Maria, Jozefo kaj la dia infaneto en la herbujo! Dum la daŭro de la tuta tago, venis multaj pakaĵetoj kun donacoj kaj salutkartoj de parencoj kaj amikoj. Intertempe, tute sekrete, ĉiu familiano pretigis siajn donacojn kaj plej arte ornamis ilin. Je la sesa, kiam sonoris la sonoriloj de ĉiuj preĝejturoj, ni komencis la feston. Eklumiĝis la kandeloj en la abio, kun tre rava aspekto, kaj mia frato legis ĉapitron de la Evangelio. Poste, dum la radioaparato aŭdigis ĉarmajn kristnaskajn melodiojn, ni rekompencis unu la alian per la donacoj, pro la amo kaj amikeco, kiujn ni ĝuis dum la pasinta jaro. Estis ĝoja momento de feliĉo kaj danko! Krome estas kutimo, ke ĉiu havu *koloran teleron,* kun miksitaj frandaĵoj: pomoj, oranĝoj, bombonoj, ĉokoladaĵoj, marcipano k. t. p. Tiel, en gaja babilado, kantado kaj legado, ni atendis la vespermanĝon. Post tio, la katolikoj iras en preĝejon, por la noktomeza meso. Ni ĉiuj ankaŭ iris tien.

DORA SCHRÖTER - Rathausstrasse 6 - BERLIN - MARIENDORF (Germanio)

TRA ESPERANTUJO

Ni, hispanoj, estas ne multe konataj pli norde de Francio; ankaŭ estas al ni malmulte konataj la nordaj landoj, kies iom malvarma ĉarmo ŝajne timigas nin. Tamen, tiuj landoj, precipe la *vikinkaj,* logis min, ekde la unuaj korespondaĵoj post mia esperantistiĝo en 1949. Tial, do, teksinte reton da bonaj amikoj, mi sukcesis finfine, en la pasinta Julio, entrepreni vojaĝon, vere neatingebla sen la sincera frateco de la esperantistoj al humila posedanto de malriĉa poŝo, kiel fakte mi estas.

Jam nur kelkajn kilometrojn interne de Francio, en Pau, du samideanoj atendis min. Tio estis agrabla renkonto kaj etika helpo ĝis alveno en Parizo, kie, kvankam mia korespondanto estis for, atendis min lia edzino, du filetoj kaj du samideanoj, kiuj plej komforte engastigis min. Mia amiko revenis baldaŭ; kaj dank' al li, la belaĵoj de la grandega Parizo fariĝis familie konataj. Ne forpasis la ŝancoj de mia bona stelo * —en ĉi tiu okazo, verda kaj kvinpinta— ĉar tie, sur la Eifel-turo, mi renkontis alian verdstelulon; kaj, tuj post la nepraj salutoj, li invitis min daŭrigi la vojaĝon per lia aŭtomobilo. Mi dankis!

La veturo de Parizo al Duseldorfo, tra Belgio, estis belega kun tiu esperantista familio. Jen la 25ª Kongreso de S. A. T. en kies agrabla medio mi havis la plezuron ĉirkaŭpremi tri korespondantojn.

En Hamburgo mi vivis tri feliĉajn tagojn kun la tieaj samideanoj. En Kopenhago atendis min korespondanto de la unua tempo, mi salutis lin kaj marŝis antaŭen, pli norden... ĝis Stokholmo, celitaĵo de miaj deziroj. Tie mi restis ses semajnoj, ĉe malnova korespondanto, kiu ne dubis meti je mia dispono sian hejmon kaj sian plej bonan volon. Tiel plene agrablaj estis la horoj tie pasigitaj, ke mi dubas ĉu mia familio estas en Zaragozo aŭ en Stokholmo. Estu dirite, ke eĉ oni ebligis laboron; per kio mi povis akiri sufiĉan monon por la reveno kaj eĉ por aĉeti rememoraĵojn.

Jen kiel, karaj legantoj, dank' al Esperanto kaj al la esperantistoj mi povis plenumi la efektiviĝon de miaj revoj. De nun, kiu kuraĝos diri al mi, ke Esperanto estas utopio? Al ĉiu el tiuj amikoj, al kiuj mi ŝuldas la fakton koni Eŭropon, de sudo ĝis nordo, sincere mi diras: koran dankon!

SALVADOR MORALES (Zaragozo)

* Hispanismo = ŝerto.

XIV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

EN BILBAO

7-8-9-10 de Agosto de 1953

Los preparativos de este gran certamen han servido ya para reagrupar a todos los esperantistas de Vizcaya que, en noble emulación, quieren superar el éxito de los dos últimos Congresos. La valía y la solvencia de los organizadores garantiza el orden más perfecto en todos los servicios. Mientras siguen su curso los trámites legales, ofrecemos, como anticipo del definitivo, el siguiente

PROGRAMA PROVISIONAL

7 de Agosto. — Viernes

A las 10. - Entrega de documentación a los congresistas y tertulia preliminar.
A las 12. - Recepción en el Ayuntamiento.
A las 18. - Solemne apertura del Congreso y Primera Sesión de Trabajo.
A las 23. - Partido de pelota vasca.

8 de Agosto. — Sábado

A las 10. - Visita al puerto de Bilbao en remolcador.
A las 13. - Aperitivo.
A las 17. - Segunda Sesión de Trabajo.
A las 23. - Velada literaria.

9 de Agosto. — Domingo

A las 11. - Misa solemne con sermón en Esperanto.
A las 12. - Festival de danzas vascas ante la iglesia.
A las 13. - Fotografía colectiva.
A las 14. - Banquete oficial.

10 de Agosto. — Lunes

A las 10. - Excursión para todo el día por la costa vasca.
A las 23. - Sesión de clausura y despedida.

* * *

Se pondrá un especial cuidado en la cuestión de los alojamientos, facilitándose las máximas comodidades con un mínimo de dispendios. A tal fin, es casi seguro que funcionará también el ya tradicional campamento, en un agradable paraje.

Se espera una nutrida concurrencia de samideanos extranjeros que compartirán con nosotros la emoción de un mismo entusiasmo frente a la belleza incomparable de los montes vascos que, con el fondo verde de sus prados, serán para nosotros como el tapiz natural de una inmensa bandera esperantista.

En el próximo número se expedirán los boletines de adhesión. La cuota es la misma que la del Congreso último. Pero todo aquel que desee aclaraciones más concretas, puede escribir directamente desde ahora al

COMITÉ ORGANIZADOR DEL
XIV Congreso Español de Esperanto
Ronda, n.º 32 - Teléfono 30.330 - BILBAO

LOS CURSOS DE ESPERANTO P

Nuestra labor ha tenido gran aceptación
cripciones para la enseñanza por correo del
Para que nuestro trabajo resulte fructífer
muchos los matriculados. El medio más eficaz
de los esperantistas, dando a conocer nuestro
a los lectores del BOLETIN, tengan la amabili
sus amistades —presuntos alumnos de nuestr
mos directamente hojas informativas de los
enumerando las múltiples ventajas que repo
Esperamos estas relaciones que han de f
impuesto, y que haremos efectiva si todos

Cursos de Esperanto por Correspondencia de

Calle Forn, 19 — MO

Cumpliendo el acuerdo del Congreso, se está acti Español-Esperanto, en el que se refundirá to materia, en nuestro país. Dada la amplitud que puedan facilitar algún material, se relacionen con

Dirección: Ramón Molera - Calle Hospi

INTER LA PROZO

Pro natura kontrasto, la varmo estas ŝatata favoro dum la vintro, kiam glacias kaj neĝas kaj frostas en la norda hemisfero. Sed en la bela regiono, kie situas mia foresidejo, la suno daŭre brilas per helaj radioj, kiuj plaĉe mildigas la tutan medion, obligante la karan regalon ĝui printempan veteron, kvankam klare kaj argente jam tintas en aero, inter ĥoro de kanzonoj aŭ reciprokaj bondeziroj, super brikoj de marcipano, la sonoriloj de Kristnasko.

Sub la efiko de tiu beno, spertante la kareson de envolvanta melodio, mi elektas por recenzo la religiajn gazetojn, kiel ĉiujare mi kutimas fari por la decembra parado.

ESPERO KATOLIKA, la serioza kolego, en redakcia artikolo trafe respondas al ricevita protesto kontraŭ tie aperinta raporto pri la vino, kvazaŭ la katolika revuo varbus por la alkoholismo. Jen kelkaj vortoj de la redakcio: «Preskaŭ ĉiu persono havas sian amatan ĉevaleton; ankaŭ ni. Tamen decas, ke oni tenu la bridojn, por ke ĝi ne konduku la mastron al nedezirataj lokoj». «Laŭ la persona koncepto, ĉiuj aferoj nur estas bonaj aŭ malbonaj, kiagrade ili harmonias kun la persona vidpunkto». «Ni scias, ke eĉ en ege gravaj aferoj, oni deklaras esti la laŭtparolilo de grandaj amasoj; tamen, oni forgesis unue konsulti tiun grupon». «La abstinenculoj mem ne akordiĝas, ĉu oni devas konsideri la vinon, kiel alkoholaĵon». «Kion pensi pri la edziĝofesto en Kanao,

R CORRESPONDENCIA

se reciben constantemente insioma auxiliar internacional. compensado es preciso que sean a conseguirlo es la ayuda directa rvicio. También queremos pedir ad de indicarnos direcciones de cursos— y nosotros les enviaresmos y si es preciso una carta el estudio del Esperanto. litarnos la tarea que nos hemos ayudan. Gracias anticipadas.

Federación Esperantista Española

(Barcelona)

ndo la preparación del Diccionario lo hecho hasta ahora, sobre esta a de tener, rogamos a todos los que Comisión encargada de este trabajo

, 13 - MOYÁ (Barcelona)



Vista de la interesantísima Exposición Esperantista organizada en Moyá c y muy diverso material expresamente recibido de todo el mund

DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

kie Kristo ne aliigis vinon en akvon, sed akvon en vinon; kaj la Evangelio aldonas, ke ĝi estis de bona kvalito!» Tiaspeca polemiko, kvankam ekster la specifaj temoj de la gazeto, agrabligas kaj plivigligas la enhavon, kiun oni kompletigas per ceteraj informoj kaj kroniketoj; unu el ili pri nia 18ª Kongreso, kun favoraj vortoj kaj gratuloj al nia laboro. LA ĜUSTA VOJO, la internacia katolika cirkulero, per lerta distribuo de la tekstoj liveras varian enhavon, kiun oni legas plaĉe. Meditiga estas jena fragmento: «Timo ŝteliras tra la Tero; oni sin sentas senpotenca kaj malgranda, konsiderante la frenezan okupiĝon pri eltrovaĵoj kaj atombomboj; kaj oni sin demandas, ĉu venonta milito frakasos nin ĉiujn». La hispanaj amikoj ĝojos scii, ke por la venonta jaro, ili povos rekte pagi kaj aboni tiun gazeton. LA SEMISTO daŭras aktive, kiel ĉiam, en sia rolo de informilo de germana katolika Esperanto-centro; kvankam malgranda folio, ĝia bela kaj klara preso donas ĉarman aspekton, kiu bone influas ĉe la legantoj. LA PONTETO vigle laboras, kiel bulteno de la franca sekcio de Kristana Esperantista Ligo Esperantista, kiu reprezentas alian branĉon de nia Movado; mi ne volas neglekti la sekvantajn vortojn, kiuj certe donus temon por longa polemiko en la «Laŭtparolilo» de nia Bulteno: «Estas tre malnova kaj kaduka temo pretendi, ke ĉiu raso, pro sia origino, sia formiĝo, sia elkreskado, devas havi sian propran religion kaj praktiki ĝin laŭ formoj aŭ ritoj, kiuj plej bone respondas kun ĝiaj aspiroj kaj kulturo». CRUZ DEL SUR estas folio de Argentina Esperantista Katolika Asocio, kiu bone kontribuas per sia laboro en la disvastigado de nia ideo en suda Ameriko.

Cetere, okaze de Kristnasko kaj Novjaro, la esperantistaro fariĝas eksterordinare skribema; de nacio al nacio kaj de urbo al urbo flugas belaj kartoj kun ĝentilaj salutoj, kvazaŭ spirita bilanco de tutjara korespondado. Multaj el tiuj privataj salutoj estas majstraj pecoj de literaturo; tial estas laŭdinda kutimo montri al ĉiuj konatoj la recevitajn leterojn aŭ kartojn por ke ili estu publikaj heroldoj pri la efektiva ekzisto de la esperantista popolo. Gravulo en nia movado antaŭ ne multe diris, ke la esperantistoj estas tro modestaj, ĉar ili tiel nature konsideras ricevi poŝtaĵojn el plej malproksimaj landoj, ke ili ne plene taksas la specialan privilegion, kiun ili posedas rilate ĉiujn aliajn personojn, por kiuj la mondo estas ŝlosita kaj multe pli reduktita ol fakte ĝi estas, bonŝorte, por ni.

En ĉi tiu punkto de mia medito, la suno subiris en rapida forpaso. La unuaj steloj eklumiĝas en la ĉielo al kiu mi turnas rigardojn, kun naiva iluzio ekvidi reale la grandan stelon, kiu abunde nun sin montras sur kristnaskaj gratulkartoj, kiel indiko de direkto al tiu ideala mondo, kiun por vi deziras ĉe sojlo de nova jaro

LA LEGEMA KOBOLDETO

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● FRANCIA.—«Journal de Médecine», de Lyon, publica resúmenes en Esperanto de los artículos médicos insertos en esta revista científica de tan acreditado prestigio.

● ITALIA.—«Ente Provinciale del Turismo», de Bologna (Vía Castiglione, 2/g). ha editado en Esperanto un interesante folleto turístico de la ciudad, que puede solicitarse gratuitamente de la oficina indicada, donde serán atendidas las peticiones.

● YUGOSLAVIA. — Preparando el 38 Congreso de «Universala Esperanto-Asocio» (25 de Julio al 1.° de Agosto de 1953), se ha editado un magnífico folleto ilustrado en Esperanto sobre Zagreb, capital de Croacia, donde tendrá lugar la reunión.

● AUSTRIA.—La Organización Juvenil de la Cruz Roja Austriaca (Osterreichisches Jugendrotkreuz - Schwarzenbergstrasse, 5 WIEN 1), ha organizado cuatro cursos de Esperanto, dos para muchachas en Abelegasse, 29, y dos para muchachos en Koppstr. 75.

● HOLANDA.—Los periódicos «De Noord-Amsterdammer», de Amsterdam, y «Nieuwe Noordhollandse Courant», de Purmerend, ha iniciado la publicación de cursos de Esperanto, para difundir entre sus lectores el estudio inicial del idioma auxiliar.

El Comité Central de Floricultores ha editado un folleto ilustrado en Esperanto sobre los célebres bulbos holandeses: tulipanes, narcisos, jacintos y otros. Se puede solicitar gratis de «Centraal Bloembollencomité»-Wilheminastraat, 13 rd. HAARLEM.

● NORUEGA.—En la Escuela Superior «Frodtun», de Stavern, la profesora francesa Jeanne Dedieu habló en Esperanto sobre el atractivo tema: «Impresiones de España».

● ESTADOS UNIDOS. — El célebre periodista Walter Lippmann, especializado en asuntos internacionales, colaborador del «New York Herald Tribune», cuyas crónicas «Hora Mundial» llegan a todos los países del mundo. es un veterano esperantista, lo que le facilita un íntimo contacto con los distintos pueblos y naciones que visita.

● GUATEMALA.—La «Exposición Mundial de Dibujos Infantiles», organizada por la Dirección General de Bellas Artes del Ministerio de Educación Pública, ha resultado un gran éxito. Se recibieron 1.300 dibujos y pinturas infantiles de veintiún países diferentes, de los que se seleccionaron 260 para exponer en la capital, y el resto para organizar una exposición ambulante por otras ciudades y pueblos. El Departamento de Educación Estética editó un catálogo y folleto en español y Esperanto, con reproducción de siete de los dibujos expuestos. Visto el éxito de esta demostración, se ha preparado por el mismo organismo gubernamental un concurso escolar bajo el lema: «Los niños del mundo cantan», a base de cantos folklóricos de todo el mundo.

● BRASIL.—En Coraçao de Jesús (Minas Geráis) se ha rotulado con el nombre de «Praça Esperanto» una vía de la población, siguiendo el ejemplo de otras ciudades.

● ARGENTINA. — Recientemente, el libro póstumo de doña Eva Duarte de Perón «La razón de mi vida», que tanta difusión logró alcanzar, ha sido traducido al Esperanto.

La revista técnica española RADIO-VISIÓN (Apartado de Correos 11.011 - Madrid), siguiendo el ejemplo de otros colegas extranjeros, publica al frente de cada artículo un resumen en Esperanto del tema expuesto por el autor. Hemos de felicitarnos por tan laudable iniciativa.

CURSOS COORDINADOS DE ESPERANTO

Bajo los auspicios de la doctora en jurisprudencia y sociología T. Peter-Ruetschi, de Zurich, se ha elaborado un plan para organizar cursos de Esperanto en varias ciudades europeas y, a continuación, combinadamente relacionar entre sí a los participantes, a fin de sentar una base de efectiva cordialidad para la comprensión internacional.

Universidades de diez ciudades, en ocho países, se han sumado al plan y durante este curso 1952-53 se siguen los estudios. He aquí la relación: Zurich (Suiza), Copenhague (Dinamarca), Stuttgart (Alemania), París y Estrasburgo (Francia), La Haya y Amsterdam (Holanda), Bruselas (Bélgica), Manchester (Inglaterra) y Florencia (Italia), y se está en contacto con otras trece ciudades en Inglaterra, Austria, Francia, Grecia, España, Italia, Noruega y Suecia. Es de confiar que este plan, científicamente organizado, signifique un gran avance en la expansión del Esperanto y demostración práctica de su utilidad.

El estudio del Esperanto es una distracción y una provechosa utilidad

NIA LINGVO ESPERANTO de Karl Wanselow. Eldono de «Berliner Esperanto-Verlag». Teupitzerstrasse, 111 - Berlin-Neukolln (Germanio). Prezo, kun afranko: Du internaciaj respondkuponoj. La tuta serio (tri kajeroj): kvin int. respondkuponoj.

Jen plaĉa kajero kun 44 poeziaĵoj, el kiuj 26 estas agorditaj laŭ pli malpli konataj melodioj. La aŭtoro vere majstras la lingvon; ĉar li, sen deformiĝoj, sen novaj vortoj, eĉ preskaŭ sen uzo de la apostrofo, atingas perfektajn versojn. Mi ne konas ĉiujn citatajn melodiojn; sed mi asertas, ke tiuj de mi konataj bonege sin adaptas, laŭ ritmo kaj sento, al la plej pura poezio. La aŭtoro defendas, do, la preferon de poezio por la lingvo-lernado, kaj certe li pravas. La instruantoj agus bone uzante tiun rimedon, bedaŭrinde iom forgesata ĉe ni, ne nur ja en la instruado de Esperanto...

Oni devas mencii kun danko, ke unu el la plej belaj pecoj —la 22ª— temas vere delikate pri hispana elmigrinto. Kun simila enhavo, ĵus aperis la dua kajero, kaj en Januaro aperos la tria de la sama serio.

AMALIA NUÑEZ DUBUS (Pamplona)

JARLIBRO DE U. E. A. 1952 - Dua Parto. Neaĉetebla asocia informilo, liverata nur al individuaj membroj de Universala Esperanto-Asocio.

La regula Jarlibro de U. E. A. enhavas en ĝia dua parto por 1952 resuman raporton pri la progresoj de Esperanto dum la pasinta jaro, faritaj de U. E. A. mem aŭ de landaj kaj fakaj asocioj; per ĝia legado, oni konstatas la malrapidan sed sinsekvan antaŭeniron de la organizata Esperanto-movado.

La libreton finas Fervoja Terminaro, unua parto de faka vortareto, necesa por tiu multenombra branĉo de la esperantistaro

THE ASAHI PICTURE NEW

Ekzempleron de ĉi tiu japanlingva gazeto dissendis «Esperanto - Societo de Telekomunika Laboratorio» (1.551 Kiĉiĵoĵi Musaŝimo-ŝi. Tokio) kun esperantaj klarigoj, informoj kaj fotoj, koncerne la atombombon, kies unua viktimo estis la urbo Hiroŝima. Celante amasan komprenon ĉe la homoj, la revuo montras nek sciencajn nek kuriozemajn bildojn, sed fotojn pri la kruelaj konsekvencoj de la timinda detrupotenco de la atombombo, kies drasta minaco ankoraŭ nun ŝvebas.

LLAVE DEL ESPERANTO - Hispana-Esperanto ŝlosilo. tria eldonpreso de «Urugvaja Esperanto-Societo». Prezo: 0'08 usona dolaro. Mendoj ĉe S-ro Rodolfo García. Strato Yaguarón, 1397 - Montevideo (Urugvajo).

Vortareto ĉiam estas interesa; kaj ĉiu ŝlosilo ebligas kunporti en poŝo radikvortaron por tuj faciligi klarigon dum kiu ajn cirkonstanco. Cetere, la recenzata ŝlosilo enhavas komercan vortliston, kio nuntempe estas taŭga servo por uzi la lingvon en oportunaj komercaj rilatoj.

Por ni, hispanoj, la libreto estas tre utila en nia deziro atingi kvanton da ili por veki intereson ĉe konatoj, kiel estontaj gelernantoj kaj eĉ aktivaj samideanoj.

TRA LA JARO — Esperanta Lernolibro verkita de Lucy E. Waddy, eldonita de W. Ripman. Represita de Chinggu-Universitato. Taegu (Koreo).

Dank' al Profesoro Hengwi Hongg, la Esperanto-movado revekiĝas en la malfeliĉa Koreo. Sed por la instruado de la internacia lingvo oni bezonas lernolibrojn; feliĉe, Walter Ripman-eldonejo konsentis la represon de la recenzata libro. La didakta metodo estas klara kaj taŭga por la lernantoj, universitataj geestudentoj; ĝiaj rektaj kaj gramatikaj klarigoj, kune, faciligas kaj agrabligas la lernadon.

La libron oni povas atingi interŝanĝe kun Esperanto-libroj; ĉar, pro kaŭzo de la milito, la tieaj samideanoj deziras akiri tuj alilandajn verkojn, por siaj studoj.

PREĜOJ Kolekto sur dika paperfolio 18 x 25 cm. eldonita de Esperanto - Instituto «Malnova Turo» Eindhoven, Nederlando. Prezo: 3 ekz. 1 int. resp. kupono.

Ĉi tiu folio, presita sur dika bonkvalita papero, aspektas tre bele. Post enkadrigo, oni povas ĝin pendigi sur muro de ĉambro.

La kolekto konsistas el jenaj preĝoj: Patro nia, Anĝeluso kaj la Preĝo unue dirita de Nia Sinjorino de Fatima.

La preso estas tre klara kaj facile legebla, la lingvo flua kaj bela. Nur unu rimarkon mi devas fari pri la stranga forigo de la litero o en la vorto Jesu, kio unuamomente aspektas kiel preseraro; sed, pro ripeto, oni konkludas, ke tio estas intence farita de la tradukinto, kiu, ŝajne, hezitante inter Jezuo kaj Jesuo, elektis la novan formon, kiu certe ne estos facile akceptebla de multaj legantoj.

ERNESTO HURTADO.

Esperanto-libro devas esti unue en la recenzejo de gazeto... Sed poste, por ŝpirita plezuro kaj instruo, en la breto de via biblioteko.

☆ LA LERNEJO

F. G. H. en Badalona. — Responde al via afabla letero, mi sincere konfesas, ke mi ne estas kompetenta por solvi viajn dubojn pri la ĝusta uzado de IRI kaj VENI, REIRI kaj REVENI. Do, humile mi konsultas la Plenan Vortaron kaj transskribas: IRI = Moviĝi de iu loko al alia: *Iri paŝe, ĉevale; la aŭtomobilo iras rapide.* Moviĝi al iu difinita loko aŭ celo: *Iri al la kongreso, iri hejmen.* REIRI = Iri kaj veni returne al la deira loko: *ira kaj reira bileto.* Iri denove, duafoje: *mi reiros al vi la proksiman semajnon.* VENI = Moviĝi tien, kie estas la persono, kiu parolas, aŭ al kiu oni parolas: *mi vokas la knabon kaj li venas, mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ* REVENI = Denove veni tien, de kie oni jam foriris: *reveni hejmen en la difinita tago.* Kiel vi konkludos, el la menciitaj ekzemploj, same kiel okazas en similaj esprimoj en kataluna aŭ valencia lingvo, foje oni povas uzi same *iri* kaj *veni,* sed la komprenebleco estas klara, ĉu per *iri* ĉu per *veni.* Vi neniam ĝenas min, kaj mi dankas vian saluton. Mi ankaŭ altestime resalutas.

JUAN BOSCH.

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a DICIEMBRE 1952)

Suma anterior	6.514	Ptas.
Carlos Belzer - Caracas	65	»
M. Lloberas - Tarrasa	15	»
F. Alsina - Barcelona	60	»
S. Alberich - Barcelona	60	»
F. Santacruz - Barcelona	5	»
F. García - Badalona	25	»
J. Ibern - San Adrián del Besós	5	»
M. Ortigosa - Zaragoza	3	»
R. Vizcaíno - Valencia	50	»
G. Sanféliz - Valencia	10	»
J. Bosch - Valencia	10	»
L. Pérez - Valencia	25	»
Lolita Quiles - Valencia	10	»
R. Quiles - alencia	10	»
F. Boscá - Valencia	5	»
R. Herrero - Valencia	25	»
E. Hurtado - Valencia	15	»
J. Lenaers - Valencia	25	»
E. Prades - Valencia	25	»
D. Lloréns - Valencia	50	»
G. Bosch - Valencia	50	»
M. Ruiz - Valencia	5	»
H. Marco - Valencia	10	»
E. Tudela - Valencia	50	»
E. Pérez - Valencia	50	»
J. J. Forné - Valencia	10	»
R. Herrero (hijo) - Valencia	5	»
E. Herrero - Valencia	5	»
L. Hernández - Valencia	53	»
Total general	7.250	»

¡Gracias, amigos, así se cumple! Las cifras de este magnífico total general ponen de manifiesto, mucho mejor que todas las palabras, el fervor y la vida del esperantismo español.

Prosperon kaj sanon en la Nova Jaro 1953"
deziras al ĉiuj siaj estimataj geamikoj
Izak kaj Alida Schoon - Harry kaj Henny Van Zijl
OOIEVAARSTRAAT, 9
HAARLEM N (Nederlando)

ANONCETOJ

La urbeto Bingen, ĉe la bordo de la Rejno, eldonis novajn prospektojn germanlingvajn, kun aldono en Esperanto. Petu informojn kaj faldfoliojn rekte al la urba trafikoficejo, kiu korespondas en Esperanto

Adreso: Stadtisches Verkehrs - und Presseamt
BINGEN AM RHEIN (Germanio)

Nova franca Esperanta Klubo en Suda Germanio estus feliĉa korespondi kun hispanaj gesamideanoj.
Adreso: S-ro Petro Rabrioux
SP 68114 - BPM 523 B (Germanio)

Ĉiu, kiu intencas korespondi per bildkartoj, povas peti interŝanĝon al
Osterreichische Jugendrotkreuz
General Sekretariat
Schwarzenbergstrasse, 5 WIEN 1 (Aŭstrio)
aŭ al instruisto S-ro Leopold Gachanes
Pelzgasse, 7 - 11. WIEN 15 (Aŭstrio)

GRAVA ATENTIGO!!

Svisa Radio-Asocio dissaŭdigos specialan elsendon en Esperanto por Sud-Ameriko kaj Iberia Duoninsulo. Oni alvokas ĉiujn samideanojn por ke ili aŭskultu ĝin kaj sendu kontrolon al

Schweizerische Rundspruch - Gesellschaft
Neuengasse, 28 — Bern (Svisio)

La elsendo okazos la 31an de Januaro 1953. je la sekvantaj horoj kaj ondoj.

21.00 horo, sur ondoj 31'04 kaj 49'55.
23.15 horo, sur ondoj 25'28, 25'61, 31'04, 31'46, 41'61.

KARL JOST, LA SVISA PIONIRO, MORTIS

En la aĝo de 76 jaroj forpasis tiu brava batalanto, kies tuta vivo estis aktiva agado por Esperanto. En la pasinta numero de BOLETIN *aperis, kvazaŭ speciala privilegio, lia lasta artikolo, kiu klare prezentis lian viglan temperamenton, ĉiam en dejoro. Al lia familio kaj al la svisa samideanaro, ni atestas nian kondolencon.*

«RADIO ALERTA» DE VALENCIO *daŭre elsendas ĉiumerkrede sian belan programon «Esperantista Mikrofono», je la 23'30 hispana horo (22'30 en Greenwich). La elsendoj provizore okazas per mallonga ondo de 7 megacikloj, 43 metroj. Adreso: Colón, 11*

PERIS - G. V. MARQUÉS DEL TURIA, 28 - VALENCIA